

N°176  
octobre  
novembre  
décembre  
2016

# LA INFORMILO

N° 176  
oktobro  
novembro  
decembro  
2016

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières

esperanto  
France-Est

ESPERANTO  
2016  
Justa komunikado

Esperanto  
la lingvo de l'amikeco  
sen landlimoj

## ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

### ESPERANTO

regroupant  
les départements

**Bas-Rhin (67)**

**Haut-Rhin (68)**

**Meurthe-et-Moselle (54)**

**Meuse (55)**

**Moselle (57)**

**Vosges (88)**

Maison des Jeunes  
et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

**FR-54000 NANCY**

### ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 17€

Reta abono: 7,50€

## UN COMMISSAIRE EUROPEEN ESPERANTOPHONE




L'ancien ministre de la santé lituanien, Vytenis Andriukaitis, actuellement Commissaire Européen pour la Santé et la Sécurité Alimentaire a participé en juillet 2016 à l'université de NITRA (Slovaquie) à une conférence sur les problèmes linguistiques dans l'Union Européenne. Elle a réuni des responsables politiques ainsi que des linguistes européens.

Les langues officielles de la conférence ont été le slovaque, l'anglais et l'espéranto. Et c'est en un espéranto parfait que Vytenis Andriukaitis a parlé des imperfections de la politique linguistique dans les instances européennes. Et il n'a pas hésité à proposer l'espéranto comme solution.

La déclaration de Nitra adoptée à la fin de la conférence se termine ainsi: Nous avons créé l'Europe, il reste à créer les européens.

**Feliĉan novan jaron 2017 al ĉiuj**

<b>Espéranto France-Est</b>		<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>
<b>La Informilo</b>	Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>	Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>
<b>Rédaction: Redaktoro:</b>	Edmond Ludwig kaj André Grossmann	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:	Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci	un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.		

<b>Komitato de la Asocio</b>		<b>Comité de l'Association</b>	
Funkcio	Adreso	Telefono	Ret-adreso
Prezidanto + PKK <i>Président + Cours par correspondance</i>	S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR	03.89.77.52.56	esperanto.eludwig@orange.fr
Sekretario <i>Secrétaire</i>	S-ro Robert KUENY 30, rue des Champs 68690 GEISHOUSE	03.89.82.37.62	kueny.robert@neuf.fr
Vic-sekretario <i>Secrétaire adjoint</i>	S-ino Catherine KREMER 20, Voie Sacrée 55100 VERDUN	03.29.85.05.09 03.02.13.01.32	catherine2.kremer@laposte.net
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	03.69.54.46.93	andreo.ag16@free.fr
Libroservo <i>Service Librairie</i>	S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE	03.83.53.57.54	jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net
Aliaj komitatanoj	S-ino Liliane BERSWEILER	03.83.47.41.36	liliber54@yahoo.fr
Assesseeurs	S-ino Micheline COLNOT	03.83.27.46.93	michelinelcolnot@orange.fr
	S-ro Jacques HERLÉ	03.87.01.00.39	jacques.herle@laposte.net
	S-ro Jacques PINEDA	03.89.42.88.54	pineda.ventron@gmail.com
	S-ino Simone KIRY	03.89.57.68.10	simone.kiry@gmail.com
	S-ino Ginette MARTIN	03.29.24.68.46	gimavo@wanadoo.fr
	S-ino Madette AST	03 87 01 32 85 06 70 94 11 84	madette20@hotmail.fr
	S-ino Gisèle BERTAPELLE	03.83.56.17.37 06.80.68.94.78	bertapelle.gisele@wanadoo.fr
	S-ino Catherine HEL	03.83.47.63.07	cathello@laposte.net

<b>Abono al La Informilo →</b>	17 eŭroj	reta abono: 7,50 eŭroj	← <b>Abonnement à La Informilo</b>
Pagoj per ĉeko je la nomo de →	<b>Esperanto France-Est</b>		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>
Pagoj per ĝiro al jena konto →	<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <i>Paiement par virement au compte</i>
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →	S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier

1. Vytenis Andriukaitis	15. Staĝo en Colmar	<p><b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b>  <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b>  bulletin d'information bilingue sur l'espéranto  édité par l'association culturelle  <b>Esperanto France-Est</b>  MJC PhiJippe Desforges - 27 rue de la République  <b>54000 NANCY</b>  Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b>  Rédacteur provisoire : André Grossmann  Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b>  <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i></p>
2. Komitatanoj kaj Menuo	16. Esperanto-ligo Filatelista	
3. Angulo de la prezidanto	17. Nia Vilaĝo	
4. Albert Schweitzer	18. Nia Vilaĝo	
5. Semajno en Cambrils	19. Nia Vilaĝo	
6. Semajno en Cambrils	20. Arkones	
7. Semajno en Cambrils	21. Arkones	
8. Staĝo en Rastatt	22. ILEI-kongreso en Colmar	
9. Staĝo en Rastatt	23. ILEI-kongreso en Colmar	
10. Informadi pri Esperanto	24. Enigmo kaj distraĵo	
11. Vojaĝi per aŭ sen Eurolines	25. Abono kotizoj + libroj	
12. Libro: kvin geamikoj	26. Kotiz-tableo	
13. Libro-servo	27. Eŭropa Rendevuo	
14. Staĝo en Colmar	28. Fototeko Eŭropa rendevuo	

Karaj gesamideanoj,



2017 estos jaro de gravaj balotoj en nia lando. Svarmas la kandidatoj de diversaj partioj kaj partietoj. Nin civitanojn atendas la tasko elekti la plej kapablan aŭ almenaŭ la malplej malkapablan aspiranton. Ni tamen konfesu, ke la tasko vere ne facilas!

Ŝajnas, ke post retrorigardo, la eksiganta prezidento ne tre kontentas mem pri siaj realigoj kaj ne rekandidatiĝas. Ĉe la multnombraj kandidatoj ni almenaŭ ion konstata: ĉies dentoj estas longegaj! Ŝajnas, ke la funkcio allogas svarmon da aviduloj. Vi ja konfesos kun mi, ke la prezidenta palaco estas belega rezidejo. Ĉu ne?

Feliĉe la provbalotoj iel sukcesos limigi la nombron de la kandidatoj, kondiĉe ke ĉiuj eniru la sistemon, ĉar nur tiuj, kiuj iel opinias, ke ili havos bonŝancon venki, partoprenos tiun prov-ludon. La aliaj rezervas por si la veran balotadon!

Nu! Ankaŭ en Esperanto France-Est dum Ĝenerala Membrokunveno, kies dato ankoraŭ ne estas fiksita, necesos elekti estraron kaj prezidanton. Ankaŭ en nia asocio la prezidanto sin demandas - jes, jes -, ĉu li kapablos iel pligrandigi la nombron de la membroj en ĉi-nuna transira epoko al diĝita komunika sistemo! Ĉu ne bezonatus trovi pli kapablan reklamanton kaj rekrutanton? Ĉu la prezidanto sukcesos "kunigi" la samideanojn! Ĉu ankaŭ en Esperantujo iam svarmos la kandidatoj? Ĉu? Ĉu. . . ?

Edmond LUDWIG

## Zamenfo-festo en La Forge (Wintzenheim)

La 10an de decembro okazis la 3-landa Zamenhof-festo ĉi-foje organizita de Edmond Ludwig kaj Michel Basso. Ege interesa kaj instruiga estis la vizito al la domo/muzeo de Albert Schweitzer en la vilaĝo Gunsbach. La partoprenantoj ricevis detalajn informojn pri la vivo kaj la filozofio de tiu ĝangala kuracisto. Jen tradukoj faritaj de Edmond.

### Kiel naskiĝis la koncepto de respekto al la vivo ĉe Albert SCHWEITZER Eta resuma prezento

La Unua Mondmilito ĉesigis la promesplenan agadon de Albert SCHWEITZER en la ĵus ekkreiginta gabona ĝangala hospitalo de Lambaréré. Ĉar Alzaco tiam apartenis al la Dua Germana Imperio, Albert SCHWEITZER estis konsiderata malamika eksterlandano. Unue li rajtis plulabori sub daŭra gardado. Poste ĉian ajn laboron oni malpermesis al li. La tiam neatendita libera tempo donis al li la okazon cerbumi pri problemo, kiu lin de longe okupis: la milito signifis por li antaŭsignon por perdiĝo de la civilizo. La agnosko de la malhoma konduto okaze de milito klare montris, ke la homoj rezignis je la deziro agadi por justa konduto de la individuoj kaj por vera homa socio. Jen kio devus esti civilizo.

Kiam sciigis, ke inter la blankuloj, kiuj antaŭmilite vivis borde de la rivero Ogowe, dek jam pereis, unu inter la tiel nomataj "sovaĝuloj" deklaris: 'Se la triboj ne kunvenas por preparoli la aferon, kiel ili povas pagi ĉiujn ĉi mortintojn?'

Schweitzer diris: "Jam dum miaj unuaj universitataj jaroj mi komencis dubi, ĉu la homaro vere suriras vojon al progreso. Dum tiom da okazaĵoj mi estis devigata konstati, ke la publika opinio ne nur ne rifuzis kun indigno publike deklaratajn malhumanajn opiniojn, sed ilin eĉ aprobis. Nun la milito furiozis pro rezulto de la dekadenco de la civilizo."

Konsciante ke plendi pro la dekadenco de la civilizo ne utilas, Schweitzer serĉadis novajn vojojn por progresigi la civilizon. Tiel iĝis klare por li, ke la civilizo estas ege ligata al ia vivkoncepto. Nur kiu jesas je la vivo kaj la mondo, ankaŭ kapablos krei civilizon. La jeso je la vivo kaj je la mondo necesigas etikon, t.e. justan respondecan agadon. Etiko estas la klopodo al atingo de la idealo de la boneco.

Li deklaris: "Tiam mi ekserĉis la konojn kaj la konvinkojn, kiuj estis je la origino de la deziro de emo al civilizo kaj la kapablo ĝin realigi. Unu inter la plej klaraj signoj de la degenerado de la civilizo estas, ke la antaŭe proskribita superstiĉo denove akcepteblas fare de la socio. Kio do estas civilizo? La esenco de la civilizo estas la universala deziro de progreso, kiu konscias, ke etiko estas ties plej grava valoro. Sed kia estas la vivkoncepto, en kiu kaj la universala kaj la etika deziro de progreso estas **pravigeblaj** kaj kunigeblaj? Ĝi konsistas en etika mond- kaj vivkoncepto."


Vane Albert SCHWEITZER serĉis dum monatoj respondon al la demando, kiel homo kapablos jesi je si mem kaj je la mondo. En septembro 1915 li entreprenis longan vojaĝon sur la rivero. Dum la vespero de la tria tago li subite trovis la esprimon "Respekto al la vivo". Kiu cerbumas pri la mondo kaj pri si mem, rimarkas, ke ĉio kio lin/





ŝin ĉirkaŭas, plantoj, bestoj, homoj, same deziregas vivi. Kiu komprenas tion, estas devigata ilin ami. Pro respekto al Dio, kiu donacis la vivon al ĉiu estaĵo, por ke ĝi povu realigi sian devon, necesas respekti ĉiun, por ke tiu ĉi povu ĉi-cele pluvivi. Jen la ĝusta konduto por ĉiu ajn kreita homo. Kiu tion faras, agadas kun bono.

“Kio estas respekto al la vivo, kaj kiel ĝi naskiĝas en ni?” “La plej trafa esprimo de la homa konscio jenas: 'Mi estas vivo, kiu deziras vivi, enmeze de vivo, kiu deziras vivi'. Kiel vivdeziro enmeze de vivdeziro, homo sin difinas ĉiufoje, kiam li cerbumas pri si mem kaj pri la mondo ĉirkaŭa. Samtempe la homo iĝinta pensanta homo spertas la devigon aliri ĉies vivdeziron kun la sama respekto al la vivo kiel la propran vivdeziron. Li spertas alies vivon en sia propra vivo. Bona li konsideras la konservadon de la vivo, la promociadon de la vivo, la levadon de evoluigebla vivo al sia plej alta valoro; malbona li konsideras la detruadon de la vivo, la damaĝadon de la vivo, la minorigadon de evoluigebla vivo”. Jen la absoluta fonda principo de la moralo necesa al ĉia ajn pensado.“ “La homo pensas etike nur, kiam li konsideras sankta la vivon kiel tia, la vivon de planto kaj de besto, kiel de homo, kaj kiam li helpas al ĉia vivo troviĝanta en danĝero. Nur la universala etiko de la sperto de senlime vastigita respondeco pri ĉio vivanta estas pravigebla en la pensado.“ La etiko de la respekto al la vivo do entenas ĉion, kio estas difinebla kiel amo, sindono, kompatato, kunĝojado kaj kunstrebo.



**Albert SCHWEITZER (1875 – 1965)**

Albert SCHWEITZER naskiĝis la 14-an de januaro 1875 en Kaysersberg. Kiam li aĝis 6 monatojn, lia familio ekloĝis en Gunsbach, kie li vizitis la vilaĝan lernejon. Lia patro Louis SCHWEITZER oficis kiel pastro en Gunsbach dum 50 jaroj. Li verkis detalan taglibron dum la tuta daŭro de la Unua Mondmilito.

Albert ŝatis kantadi kaj aŭskulti la organan muzikon, li ankaŭ tre bone konis rakontojn bibliajn. Okjaraĝa li ricevis la Novan Testamenton. Samjare li travivis incidenton, kiu lin ege perturbis: iun dimanĉan matenon lia kamarado Henri proponis al li ĉasi birdojn per ŝtonĵetilo. Li ne kuraĝis lin kontraŭi kaj kiam li estis ekpafinta al birdo, eksonoris la preĝejoj sonoriloj, kiuj anoncis la paskan diservon. Tiam li ekmemoris la dian ordonon: “Vi ne mortigu!”. Ekde ĉi tago li komprenis la sanktecon de ĉiaestafa vivo.

Post la elementa lernejo li vizitis dum unu jaro la liceon de Munster, kien li ĉiutage piediris. Poste li ekloĝis ĉe onklo en Mulhouse, kie li pluvizitis liceon kaj trapasis la bakalaŭran ekzamenon en 1893.

Dekokjaraĝa li ekstudis teologion kaj filozofion en la Universitato de Strasburgo kaj iĝis profesoro en la sama universitato. Li specialiĝis en la vivoj de Jesuo kaj de la apostolo Paŭlo.

Paralele li iĝis lerta muzikisto. Li eklernis pianludadon, kiam li aĝis kvin jarojn kaj li okjaris, kiam li ludis per la organo de Gunsbach. Li iĝis fakulo pri Johann Sebastian BACH kaj tre rapide internacie famiĝis kiel organisto. Li ankaŭ fake konsiladis organfabrikistojn.

Ĉar li mem travivis feliĉan infanaĝon, li decidis en 1905 studi medicinon por labori en ekvatoria Afriko je la dispono de la tieaj malfeliĉuloj. Ĉi studojn li finis en 1912.

La 18-an de julio 1912 li edziĝis kun Helene BRESLAU.

La 26-an de marto 1913 li enŝipiĝis al Lambaréné, en Gabono, kiu tiam estis franca kolonio. Tie li ekflegis la homojn kaj ekkonstruis eĉ propramane sian hospitalon.

Ĉiufoje kiam li revenis al Eŭropo li koncerte turneis por kolekti monon cele al grandigo de sia hospitalo kaj plibonigo de la sanigado.

Kiel germana civitano – tiam Alzaco kaj Loreno apartenis al la Dua Germana Imperio-li estis devige revenigita al Francio, kie li estis internigita en laborkampo en sudokcidenta Francio. Tie li kompreneble flegis siajn malliberigitajn samsortanojn.

La 14-an de januaro 1919 naskiĝis lia filino Rhena.

En 1928 la urbo Frankfurto enmanigis al li la premion Goethe. Tiam li konstruigis domon en Gunsbach, kiu iĝis nun la Muzeo SCHWEITZER.

En 1953 li obtenis la Nobelpremion pri Paco. Per ĉi mono li modernigis la hospitalan vilaĝon de la lepruloj.

En 1958 li lanĉis alvokon kontraŭ la atombombaj eksperimentoj.

En 1959 li entreprenis sian 14-an kaj lastan vojaĝon al Lambaréne. Tie li forpasis dum sia 90-a jaro, la 4-an de septembro 1965. Li ripozas apud sia edzino kaj sia filino.

**Lia tuta vivo disvolviĝis ĉirkaŭ lia fundamenta kredo: la respekto al la vivo.**



En la sama domo en Vieno Florianigasse 8 Wien(Aŭstrio) loĝis Zamenhof 1886 kaj 1895 Schweitzer en 1909.



## La 24-a INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO CAMBRILS 1-8.10.2016

Ĉi-foje la Semajno estis iom speciala. La naŭdekjaraĝa ĉef-organizanto Luis Serrano Pérez post la alveno al la hotelo vundiĝis je mano kaj devis reheimeniĝi la sekvan tagon. La torĉon transprenis Rosa López kaj ĝis la fino ŝi zorgis pri nia bonfarto. La Semajno tamen bone disvolviĝis. Okazis kelkaj programŝanĝoj kaj aldoniĝis programeroj, sed tio ne ĝenis la partoprenantojn, kiuj helpis kaj morale subtenis Rosa-n.

Ni loĝis en ampleksa kvarstela hotelo je malalta prezo, ĉar post la sezono la hotelo jam fermiĝis ĝis printempo. Abunda manĝaĵo en formo de bufedo kun boteloj da akvo kaj vino kontribuis al kontento de ĉiuj. La vetero estis agrabla kaj suna, do eblis sin bani en la hotela naĝbaseno aŭ en la maro, situanta tuj trans la strato.



La dimanĉan inaŭguron ĉeestis kaj bonvenigis nin reprezentantino de la urbodomo. Post la komuna fotado ŝi kun granda intereso aŭskultis diskutojn kaj klarigojn pri Esperanto.

La programo konsistis el diversaj prelegoj, forumo pri Esperanto, transdono de premio Ada Sikorska, vesperaj distraj programeroj kaj unu tuttaga ekskurso. Estis ankaŭ sufiĉe da tempo por promeni kaj ripozi.



Rudolf Fischer regalis nin per rakontado kun interesaj bildoj pri pilgrimado al *Santiago de Compostela* kaj pri spertoj de sia familio kun enmigrintoj, kiujn li kun sia edzino Hedwig prizorgas. Alian tagon li prezentis "Historiajn faktojn malantaŭ la legendoj".

Gian Carlo Fighiera rakontis pri Nibelungoj. Hubert De Meyre prezentis vojaĝon kun fervojistoj en Ĉinio kaj donis utilajn informojn por konstrui raportojn laŭ sia skemo. Gesinjoroj Buŝ







prezentis la verkistino Margarita Staraste (1914-2014). Ŝi tre bele ilustris kelkajn librojn. Pri la libro-servo zorgis Mariló Torres. Pri tri komencantinoj okupiĝis kaj instruis al ili Esperanton Monique Arnaud.



Rodica Todor gvidis forumon pri la Esperanto-movado kun interesaj temoj : avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la tradicio kaj modernigo, kiaj alternativoj por la estonteco. Esperanto de la celo al la rimedo. Valoro kaj utileco de Esperanto. Evoluo de amato al profesio, konkretaj projektoj. De neprofitcela al pagota agado. Kiel kutime la partoprenantoj laboris en grupoj pri

diversaj temoj kaj ĉe la fino unu el ili resumis la enhavon de ilia diskuto.

Zsófia Kóródy kaj Peter Zilvar detale prezentis la Esperanto-centron

en *Herzberg am Harz*. Ili parolis pri biblioteko, pri ekstermovadaj ebloj kunlabori por la disvastigo de Esperanto, pri instruado, pri ĝemeliĝo kun la pola urbo *Góra*. Ni eksciis pri iliaj projektoj kaj atingoj rilate al Esperanto. Ili prezentis filmon pri la 10-jara jubileo de "La Esperanto urbo".

La premio de Ada Sikorska estis ĉi-foje destinita ĝuste al Zsófia Kóródy pro ŝia senlaca laboro en la Esperanto-Centro de Herzberg.

Ne mankis du interkonaj vesperoj kun ŝaŭmvino kaj manĝaĵetoj, skeĉoj, kantoj kaj vigla bablado. Okazis ankaŭ la kutima vespero kun



"cremat" (bruligita rumo kun spicoj). Mankis nur folklorgrupo de "Habaneras". Tamen en la hotelo ĉiuvespere sonis muziko kaj eblis danci. Tre interesa estis spektaklo de flamenko, kiun ni ankaŭ povis ĝui.







organizado de la Semajno kaj konstatis, ke ĝi estis sukcesa. Ni ankaŭ diskutis pri la estonteco. Pro la alta aĝo de Luis Serrano la organizadon de tiu interesa evento transprenos nova skipo venontjare. Ni ĉiuj dankas al Luis pro lia multjara persista kaj aktiva laboro por Esperanto kaj organizado de tiom popularaj E-Semajnoj. Ni deziras al li trankvilan kaj serenan vivon en bona sano kun lia edzino María.

*Liba Gabalda*



Intertempe Rosa Lopez informis nin pri la forpaso de s-ro Francisc Mas, regula partoprenanto de tiaj semajnoj kaj diskra fotisto.

La duontaga ekskurso celis promenon en *Cambrils*. Dum la tuttaga ekskurso ni malkovris tre belan urbon *Morella*. Belaspektas la preĝejo de *Santa María*. Tra la konvento ni povis alveni al ruino de la kastelo starigita sur roko. Impresis la muregoj el la 11-a jarcento je 2500 metroj longaj kaj je du metroj larĝaj. Kelkaj post la vizito de muzeo de dinosaŭroj promenis en la stratoj de la pitoreska urbeto kaj ĝuis ripozon ĉe restoracio.

La lastan vesperon ni parolis pri la

#### Forpaso de Francisc Mas

Nia samideano Francisc mas, la fotisto, kvankam li ne parolis Esperanton, li estis unu el la plej entuziasma homo pri la disvastigo de nia lingvo. Li ĉiam identigiĝis kiel esperantisto per sia dorsosako, en ĝi li kunportis sian nedisigeblan fotilon por foti ĉiujn esperantajn renkontiĝojn.

Lia malavareco ne havis limon, kiam li faris raportojn, en la sekvanta renkontiĝo li jam donacis fotokopiojn al ĉiuj partoprenantoj. Li neniam akceptis, ke ni pagu ilin.

Danke al Francisc La Internaciaj Esperanto-Semajnoj kaj la esperantaj babildoj estis historie fotitaj

Kara samideano kaj amiko restu pace.

Ni kore rememoros vin

Koran saluton



## 80a regiona staĝo kaj 38-a BAVELO-Seminario 4a - 6a de novembro 2016 en Rastatt

### Bunte kaj gaje

#### Baden-virtemberga kaj orientfranca seminario en Rastatt, Germanujo, 4. -6. 11. 2016

Estis bela semajnfino por 44 partoprenantoj en la komforta klerigdomo Sankta Bernardo en la historie memorevoka urbo Rastatt, Germanujo. Konversaci-lingvo tiam: Esperanto.



En la tiea kastelo antaŭ tricent jaroj dum la „Pacintertrakto de Rastatt“ fariĝis paŝo al graviĝo de la franca lingvo kaj malgraviĝo de la latina kiel diplomataj lingvoj. Kaj tio okazis pro banala kaŭzo. La gvidanto de la franca delegacio, generalo Villard, ne bone sciis la latinan. Li pro tio insistis, ke la dokumentoj estu skribitaj en la franca. Li timis, ke alikaze la pli lingvokapablaj diplomatokolegoj je la kontraŭa flanko povus superruzi lin. Unufoje nun, baldaŭ ĉiufoje! Ĉifoje escepte oni interkonsentis, sed fiksas tion en la dokumentoj, post Rastatt tio fariĝis kutimo. Tiamaniere perdis la bona malnova latina lingvo sian dominantan terenon.



Kiu el la legantoj scias, ke hodiaŭ denove homoj kuraĝas praktiki la latinan kiel ĉiutagan lingvon? Hej vi, lernantoj de la latina en la humanismaj gimnazioj, ĉu tio ekzemplo ne estus taŭga afero por vi? Pripensu: Fakto estas, ke oni lernas lingvon pli facile, se oni ĝin ankaŭ parolas, ne nur legas. Tion scias ĉiuj modernaj lingvidaktikistoj, kaj multaj instruist/inoj de la latina hodiaŭ rekomencas instrui la latinan per aktiva konversacio.

La Esperantouzantoj konscias pri la valoro de buŝa kaj aktiva lingvouzo. Ili parolas sian lingvon matenmanĝe, tagmanĝe, vespermanĝe, la tutan tagon. Almenaŭ estis tiel en la kleriga domo Sankta Bernardo pasintan sabatdimanĉon. La redaktejo

de la ĵurnalo „Badisches Tagblatt“, de ties loka eldono por la urbo Rastatt, eksciis pri la neordinara lingva evento en sia urbo kaj sendis kunlaborantinon por subaŝkulti. Sinjorino Zerrath, la subaŝkultinto, sampersona ankaŭ estis ĉiĉerono en la loka muzeo de la urboparto Ottersdorf, nomata „Riedmuseum“ (kanejmuzeo, marĉmuzeo).







Tien la seminario ekskursis. La interesaj klarigoj de sinjorino Zerrath pri la rektigo de la rivero Rejno en la 18a jarcento interpretiĝis esperanten. La afero ja same koncernas ambaŭ apud-riveranojn, la francajn kaj la germanajn. Granda modelo de la marĉ-pejzaĝo demonstris la aspekton de la apudrejna areo antaŭ la rektigo de la rivero.

Tiu inĝeniera majstroverko estis realigita sen dragmaŝinoj, sed manlabore per puŝĉaroj. Ĝi estigis ekonomian avantaĝon por la loĝantoj de la regiono, sed ankaŭ gravajn ekologiajn damaĝojn, kiuj evidentiĝis nur poste.



Kio alia okazis en Sankta Bernardo? Kvar etaj infanoj gaje petolis tra la koridoroj de la iama gimnazio, diservoj en Esperanto okazis kaj prelego pri la esperantlingva liturgia kantlibro „Adoru“. Nepre ne rajtis manki la memorigo pri la packontrakto de Rastatt, kiu ĉesigis dektrijaran mond (!) militon de la frua Novpoko. La bataloj inter la koloniposedantaj potencoj okazis jam en kvar kontinentoj. Vespere okazis danckurso esperantlingve gvidata, oni kantis novajn kantojn en la „novlatino




„Esperanto, kiu ja multe pli facile lerneblas ol la malnova romia idiomo. Oni ludis, spektis skeĉon, kaj vesperofine kunsidis en la „knajpo“ (drinkejo), kie anekdotoj kaj ŝercoj rakontiĝis inter francoj kaj germanoj komunlingve.

Esperanto-parolantoj okupiĝas ne nur pri si mem. Krom du prelegoj pri tio, kiamaniere oni povas plikonatigi nian ĉarman 129-jarajn junan interlingvon, temis ankaŭ pri la kunlaboro kun afrikaj Esperanto-amikoj. Mramba Simba, estro de du vilaĝaroj en Tanzanio, petas por subteno de plukonstruado de

mez-lernejo kaj por operacioj de malsanaj infanoj. Liaj Esperanto-amikoj en Baden-Virtembergo flegas kontakton kun li en la „nekoloniisma lingvo“ Esperanto kaj apogas sian amikon je lia admirinda evolulaboro.

Rastatt simbolas „ĉeson de militoj“ kaj „kunlaboron“. Estis gaja kaj fruktodona kleriglaboro en la klerigejo Sankta Bernardo.



Alois Eder



### „Lago“ (ne „puto“ ...)

Kiel zorgi, ke vere okazas amaskomunikilaj rilatoj?

- Laboro pri via propra puto zorgas por via propra akvo.
- Esperanto-parolantoj estas en komuna „lago“ - ĉiu ŝatas ĉerpi el la lago („membriĝu!“, „aĉetu libron!“, „venu al renkontiĝo!“ ...), malmultaj ŝatas plenigi la lagon (informi pri Esperanto, instrui, ensociigi lernintojn)
- Ĉu asocioj pagu al gazetaraj respondeculoj? (sume inform. proks. 5 % de membrototizoj)



## Informadi pri Esperanto

Dum la aŭtuna komuna staĝo de Bavelo kaj Espéranto France-Est en Rastatt, Bruno FLOCHON, vicprezidanto de Espéranto-France prelegis pri la informlaboro antaŭ kaj dum la 100-a Universala Kongreso de Esperanto en Lille (2016). Konstateblis, ke grandega profesii-nivela laboro estis farita dum ĉi tiu kongreso: profesiece belaspektaj estis la banderoloj, la informpaneloj diversgrandaj, la afiŝoj, la prospektoj. Amaso da gazetoj estis kontaktitaj, informis radioj kaj ĉefe belgaj televido. Okazis koncertoj en la urbo kaj partoprenis ĉirkaŭ okdeko da homoj al la proponitaj rapidkursoj pri Esperanto. La sumoj investitaj por ĉi tiu laboro estis proporcie altaj. Krome en nia movado nun kunlaboras pluraj samideanoj, kiuj senpage disponigas al Esperanto siajn profesiajn kapablojn pri informado, sen kalkuli la altan nombron da deĵorhoroj. Necesas laŭdi ilin pri tio! Sed Bruno FLOCHON konfesis, ke ne amasis la novaj gelernantoj en la kursoj proponitaj de la esperantistoj de Lille post la UK.

Maljunaj samideanoj, kiuj aktivis dum la lastaj jardekoj de la 20-a jarcento memoras pri tiamaj plendoj: ni bezonas belaspektajn informilojn kaj modernajn profesinivelajn informteknikojn! Tion ni nun posedas. Sed kial en la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj eta senpaga anonceto, ekzemple pri la perkoresponda kurso de Jean-Paul COLNOT, en diversaj regionaj gazetoj sukcesis alvenigi centon da informpetoj? Informpetoj, kiujn la klubo de Nancy ofte respondis per manskribita letero! Kaj... dum staĝoj plurfoje ĉeestis 90 personoj.

Ĉi tiu ĵusa rememorigo ne estas kritiko de la nunaj modernaj informteknikoj: ni fieru, ke kelkaj inter ni kapablas realigi tian profesiecan laboron. Sed la nuna posta etapo devus esti serĉo de respondo al la jena demando: kial tiel kvalita informlaboro, kiu ja pruvis sian efikecon por aliaj asocioj kaj produktoj, ne havigas pli da sukceso al la Esperanto-movado?

Luj diros: pozitiva rezulto ja kuŝas en la plimultiĝo de retlernantoj? Sed kial ili nur gut'-post guto venas al la movado? Ĉu insisti pri la idealoj de Esperanto? Ĉe kiaj intereso-grupoj? Ĉu selekti celgrupon? Malofte mi vidis strebojn al elekto de selektitaj celgrupoj.

Jama ideo estis kreo fakasocioj, sed ankaŭ ili ĝis ne sukcesis funkcii kontentige pro la malgranda nombro de ties specialigitaj membroj.

Unu afero devus evidenti post pli ol centjara sperto: ni, aktivuloj, devas elturniĝi mem, per niaj propraj fortoj. Postbalota helpo de iaj ajn politikistoj venos nur, kiam ni sufiĉe multnombros por atingi la station de premgrupo.

Do : kiel do pluen?

E.L.

**Fotoj: Andreo kaj Ginette**





## Vojaĝoj per la aŭtobusa kompanio EUROLINES.

Tiu kompanio proponas vojaĝojn tra nia regiono, de Parizo al Budapeŝto kaj de Grenoble al Varsovio, ambaŭ tra Strasburgo. Tial okaze de UK en Nitro estis oportune vojaĝi per tiaj noktaj aŭtobusoj. En Strasburgo eblas ŝanĝi de unu aŭtobuso-linio al alia.



Certe necesas esti pacienca kaj atentema, ĉar la informoj pri la horaro ne plene kongruas kun la realo. Same ankaŭ la informoj pri la kajo en Bratislava ne estas findindaj. Tial necesas klopodi kontroli tiajn informojn surloke kaj informiĝi, ĉar la kompanio ne spontane informas siajn klientojn pri ŝanĝoj. Efektive tiu aŭtobuso startis de apuda kajo 1 anstataŭ de la kajo 15.

Tial Ginette spertis novan aventuron por sia hejmen-vojaĝo ekde Bratislava.

### Ne tro fidu EuroLines!

*Reven-vojaĝo per EuroLines 2016.*

*Mi revenis pli malsimple ol mi esperis pro eraro de la bus-entrepreno EuroLines, fakte mi bezonis 3 tagojn anstataŭ unu tagon. Kun alia esperantisto, Daniel Lachassagne, ni atendis nian buson en Bratislava sur la kajo 15, ĉiel tio estis indikita sur niaj biletoj, kaj la buso venis sur la kajo 1, kaj ni maltrafis ĝin (ni eksciis tion nur la morgaŭan tagon; ni sincere kredis, ke nia buso tute ne venis). Ĉar en Bratislava la bus-stacio estas kvazaŭ "densa aro" de busoj, la persono, kiu atendas saĝe sur la kajo 15, ne povas vidi, kio okazas sur la kajo 1 pro la amaso da busoj.*

*Nek Daniel nek mi pensis pri eraro de kajo sur bileto, ĉar ni estas relative oftaj uzantoj de EuroLines, kaj tiu problemo neniam okazintis al ni.*

*Pro tiu maltrafo de buso, ni devis atendi dum la tuta nokto en Bratislava, kaj ŝanĝi nian itineron unue ĝis Prague, do ni pagis nian bileton por Prague ĉe alia bus-entrepreno. En Prague, ni povis tuj havi alian buson EuroLines Prague-Strasbourg-Paris, sed tiu-ĉi rifuzis preni nin, kvankam ni klare rakontis pri niaj problemoj. Ni devis iri al la apuda inform-oficejo de EuroLines kaj repagi biletojn kaj reveni nur la sekvan tagon per la sama buso, ĉar intertempe la buso, kiu rifuzis nin, estis foririnta. Feliĉe Prague ravis nin, eĉ nokte dum nokta promenado kaj sidado sur diversaj benkoj. Ekzistas bona servo de valizoj en la bus-stacio de Prague, kiu gardas la valizojn pli ol 24 horojn. Ni povis turismi sen pezaj bagaĝoj. Tamen niaj okuloj malfacile restis malfermitaj pro laceco, kaj niaj kapoj foje kliniĝis pro subita dormo.*

*Kaj jen la sekvo de la aventuro por mi. Kiam, la sekvan tagon, la buso EuroLines lasis min en la nokto en Strasburgo (Daniel daŭrigis ĝis Parizo kaj Clermont-Ferrand), estis la 1a matene; mi rigardis la horarojn de la apuda tram-stacio, kaj konstatis, ke neniu tramo venos antaŭ la 4a30. Mi iom manĝis, demandis al la preterpasantoj, je kiu distanco estas la staci-domo. Oni respondis al mi: 4 km. Mi decidis iri piede por ne atendi stulte la tramon (eĉ ne tramo, sed buso+ tramo pro laboroj sur la trakoj).*

*Feliĉe la nokto estis milda kaj senpluva. En Strasburgo nokte, la stratoj estas trankvilaj kaj lumigataj, kaj de tempo al tempo oni vidas mapon de la urbo kun la noto "Vi estas ĉi-tie" (tre utila) kaj helpanto diris al mi "Vi sekvas la trakon de la tramo kaj vi ne povas maltrafi la staci-domon.*

*"Mi estis ĉe la staci-domo je la 3a30, la pied-marŝadon mi nun kutimas, mia valizo afable ruliĝis kaj sekvis min.*

*En tiu horo, la staci-domo estis fermita ĝis la 5a matene. Mi diskutis ekstere kun aliaj atendantoj; por pluraj fremdaj homoj, kiuj ne sciis pri ĝi, tiu fermo kreis verajn problemojn, sed la moderna vivo estas tia.*

*Post la eniro en la staci-domon, mi malkovris, ke mi havas trajnon por Nancio je la 6a20, en Nancio mi havis diversajn trajnojn por esti ĉe mi je la 10a45, pli frue ol mi anoncis. La sekvajn tagojn mi dormis, dormis, kaj ordigis miajn fotojn. Alia afero: pro tiuj problemoj dum la reven-vojaĝo, mi rezignis pri planita survoja vojaĝo tra Verduno. Tri tagoj sen dormo prenis mian tutan energion.*

*Poste Daniel kaj mi revenis hejmen kaj faris leterojn al EuroLines por ricevi la perditan monon (130 eŭrojn por Daniel, 92 eŭrojn por mi).*

*En la dato 2-12-2016, mi ankoraŭ ne ricevis monon el EuroLines, nek peton de pardono.*

*Same por Daniel, kvankam ĉiu el ni skribis dufoje.*

*Mi intencas informi asociojn pri tiuj fuŝaĵoj kaj mokaĵoj al la klientoj.*

Ginette



Verkinto: Julia Sigmond

Speco: romano, NOVA!

Prezo: €18.90 (-16% ekde 3 eroj)

Priskribo: La rumana esperantistino prezentas, en bele aranĝita kolekto, la korespondaĵojn kiujn ŝi ricevis de kvin tre fidelaj korespondantoj: Ada Fighiera-Sikorska, Johannes Palu, Nikolao Danovskij, Stanisław Janusiewicz kaj Tibor Sekelj.

Tiu libro estas tre interesa, ĉar la leteroj venas de dinamikaj esperantistoj, kiuj rakontas pri siaj renkontitaj problemoj, kaj ankaŭ rakontas pri siaj profesia kaj familia vivo. La stilo estas ĝenerale vivo-plena.

Ĝi ankaŭ montras, kiel la esperantistoj povis efike komuniki en epoko, kiam la inter-reto ne ekzistis.

Jen parto de leteroj, kiujn Ada Sikorska, pola esperantistino, sendas al Julia Sigmond, kiu loĝas en Cluj (Rumanujo).

tradukita de Catherine ROUX, kun la helpo de Ginette MARTIN



Varsovie, le 29 avril 1960.

Tu as certainement reçu ma dernière lettre de Varsovie, donc tu sais déjà que je me suis mariée, il y a neuf jours, avec le Secrétaire Permanent du Congrès. (Il s'agit de Gian Carlo FIGHIERA)

Le 24, j'étais à nouveau à Varsovie, car je devais encore régler beaucoup d'affaires. J'espère que je résoudrai tous ces problèmes à temps et que, fin juin, je serai avec mon mari à Bruxelles.

Nous y resterons jusqu'en septembre, et ensuite nous déménagerons en Grande-Bretagne, car le prochain Congrès aura lieu à Harrogate (au centre de la Grande-Bretagne). Je travaillerai avec lui pour le Congrès.

Comment vas-tu? J'espère bientôt recevoir de toi une lettre, dans laquelle tu me parleras de tout, n'est-ce pas?

Mon séjour à Bruxelles a été très agréable. Les espérantistes belges m'ont très bien accueillie, et ils ont essayé de me faire voir beaucoup de choses de leur pays. Ils ont aussi décidé de remplacer ma famille et ils ont organisé un très beau banquet dans un restaurant après notre mariage. Nous avons reçu quantité de télégrammes du monde entier et aussi beaucoup de fleurs.

J'ai beaucoup de travail en ce moment car, en plus de mon travail normal, j'améliore mon français, mes frappes à la machine, etc. Et tous mes amis veulent aussi me voir -les journées sont trop courtes. Que faire? Pendant ces deux mois, j'ai aussi l'intention de voir de nombreuses pièces de théâtre, car ensuite je n'aurai plus cette possibilité.

Je termine pour aujourd'hui, chère Julia, mais je t'écrirai à nouveau dans quelque temps.

Je te salue de tout coeur.

Ton Ada

Varsovie, le 2 mai 1960.

Ma chère Julia! J'ai reçu aujourd'hui ta lettre et je veux immédiatement te répondre. Merci pour ton courrier -je me suis beaucoup réjoui en lisant tes mots. Il y a quelques jours, je t'ai envoyé une petite lettre avec le faire-part officiel de notre mariage. Comme il était en espéranto, je voulais que tu aies un petit souvenir de moi.

Avec honte, je dois t'avouer qu'à mon retour à Varsovie j'ai trouvé le livre et le journal que je devais t'envoyer dans l'armoire. Quelle cervelle j'avais à ce moment-là! J'étais sûre de te les avoir envoyés! Mais j'espère, chère Julia, que tu me pardonneras et comprendras que j'étais dans une situation un peu extraordinaire. Je te promets de te les envoyer dès demain matin.

Comme tu le sais déjà, notre mariage a eu lieu le 20 avril à Rotterdam. Comme nous ne sommes croyants ni l'un ni l'autre, nous nous sommes mariés civilement. Mais cependant la cérémonie a été très solennelle, dans l'antique mairie sur la Grand Place. Nos témoins étaient deux espérantistes. Nous avons reçu beaucoup de télégrammes du monde entier, de très belles fleurs et de nombreux cadeaux. Tous étaient très amicaux.

Malheureusement, deux jours après notre mariage, j'ai dû aller à Varsovie, car mon visa belge et mon congé de la Rédaction de la radio polonaise avaient expiré. (A cette époque, Ada travaillait pour les émissions en espéranto de Radio Varsovie. Elle était salariée de l'état polonais). Nous étions tous les deux très tristes à cause de ce problème, mais que faire? J'ai dû pourtant arranger officiellement mes affaires avec la Radio, et officiellement aussi quitter ma Patrie. . .



# El nia libroservo

## Informoj



**La libroservo partoprenos la komunan staĝon en Colmar la 19/21ajn de majo 2017.**

**Plej granda parto el la 700 titoloj estos videblaj kaj aĉeteblaj tie!**

Jean-Luc Thibias



## Bona novaĵo!

Esperanto-France decidis malaltigi sian stokon de "Grands Dictionnaires Français Esperanto" forte malaltigante ties prezon.

La libroservo akiris dekon da tiuj libroj kaj povos proponi en Colmar tiun vortaron kaj ĝian suplementon je 15 €.



La vortaro enhavas 944 paĝojn kaj 32 000 tradukitajn vortojn, La suplemento de 2015 aldonas 2000 novajn tradukojn. Pro la pezo de la vortaro (kaj do de la afranko), estas prefereble aĉeti ĝin okaze de staĝo.



## Afabla kaj dankinda decido !

Gesinjoroj Hubert el Sarreguemines decidis donaci al la federacio siajn esperantajn librojn, por ke ili estu revendataj je malalta prezo,

Laŭ ilia deziro, la vendoj devos esti enkasigitaj de la federacio,

Dank'al tiu donaco, dekoj da valoraj libroj kvazaŭ novaj povos esti akiritaj de etbuĝetuloj. Kaj la mono enkasigita povos esti reuzata de la federacia libroservo por aĉeto de nove eldonitaj libroj, kaj tiel vivigi la esperantan kulturon,


Mi estimis taŭgan vendoprezon de tiuj libroj je triono de la valoro de samtitola nova libro.

### Por mendi librojn:

- Vi sendas vian mendon
  - per poŝto al : Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE 54500 VANDOEUVRE
  - per ret-poŝto al "libroservo.efe@laposte.net"
  - nur escepte per telefono: 03-83-53-57-54. Nur post la 20a horo.
- Vi baldaŭ ricevos viajn librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj)
- Vi pagas vian fakturon per poŝta ĝiro al "libroservo 2800-76 H NANCY" (indikinte sur ĝin la numeron de la fakturo), aŭ per mandato aŭ ĉeko je la nomo "libroservo" sendita al la adreso de la libroservo.  
Eksterlandanoj povas sendi internacian ĝiron al "LIBROSERVO"  
**IBAN** : FR 98 20041 01010 0280076H031 97  
**BIC** : PSSTFRPPNCY., indikante en la koresponda linio la numeron de la fakturo.

<i>Mendilo</i>	
Bonvolu sendi tiujn librojn al jena adreso:	S-ro / S-ino
En	Subskribo:





## MULHOUSE-ESPERANTO kaj

**esperanto**

*France-Est*

en amikaj rilatoj kun **BAVELO**  
invitas vin al la :

**81a Regiona Staĝo de Esperanto la 19 - 20 - 21ajn de majo 2016**  
**en la hotelo Primo Balladins**  
**5 rue des Ancêtres 68000 COLMAR**

Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en Colmar, en la kadro de IFEF-kongreso, la internacia kongreso de la fervojistoj. Ni povos ĝui la samajn programerojn de vendredo ĝis dimanĉo de tiu kongreso.

La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Mulhouse kun turisma gvidado fare de Edmond Ludwig.

Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Grazia Barboni el Italio.

Krome estas ankaŭ ebleco aliĝi al la ekskursoj de la postkongreso.



### Provizora Programo:

#### Vendrede 19-an de majo 2017

- 14a -18a Ekskurso D2 – Fervoja muzeo Mulhouse
- Poste Vespermanĝo (libera)
- 21a - 23 Kultura kaj dancvespero kun **Fernando** salono Catherinettes

#### Sabate 20-an de majo 2017

- 9a Libroservo funkcias, Catherinettes
- 9a30 Vizito al la malnova urbo
- 10a - 12a E-kurso en la hotelo
- Poste Tagmanĝo (libera)
- 14a - 18a Ekskurso D3 – Kaysersberg, Riquewihr, Hunawhr - Ĝardeno de vivantaj papilioj
- 20a Kultura vespero - **Koncerto de Grazia Barboni**, Italio, en Catherinettes

#### Dimanĉe 21-an de majo 2017

- 9a Libroservo funkcias, Catherinettes
- 9a - 12a Ĉefa prelego kaj aliaj prelegoj, salono Catherinettes
- 12a30 - 13a **Solena fermo**
- 13a Tagmanĝo (libera)
- 14a30 Komitat-kunsido de EFE



### Turismaj programoj

#### Lunde 22-an de Majo

9a – 19a Tuttaga kskurso – Strasburgo, Obernai

#### Marde 23-an de Majo

9a - 18a

Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawhr: Parko de la

cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki

#### Merkrede 24-an de Majo

9a - 18a

Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki

<p><b>Por pliaj informoj :</b> andreo.ag16@free.fr Tel. 03.69.54.46.93 poŝtel. 07.82.21.97.34 <b>Daŭre aktualigitaj informoj ĉe:</b> http://esperanto.france.est.free.fr</p>	<p>La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero. Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon <b>La Informilo</b> dum unu jaro.</p>
<p><b>Propono:</b> Se vi deziras viziti la fervojan muzeon en Mulhouse vendrede post-tagmeze post la 14a, eblas rekte veturi al tiu muzeo. De la stacidomo de Mulhouse per tramo, direkto Lutterbach, haltejo Musée.</p>	

<b>ALIĜOJ</b>	
Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio	30 €
Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio	47 €
Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto)	18 €
Junulo inter 10 kaj 25 jaroj	12 €
Infanoj malpli ol 10 jaroj	3 €

Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla.

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :**  
André Grossmann  
5, rue des Pyrénées  
68390 BALDERSHEIM

**Ĉekoj nome de:**  
André Grossmann  
CCP 819 34 U Strasbourg

**Internaciaj ĝiroj al: IBAN:**  
André Grossmann  
FR6920041010150081934U036  
69

**BIC: PSSTFRPPSTR**

**Por Germanio al nia peranto:**  
je la nomo de: Hans-Dieter Platz.  
(menciu la celon de via pago)  
Poŝtĝirokonto:  
918 56-676 (BLZ 545 100 67)  
PGA Ludwigshafen

**Pliaj informoj ĉe**  
**André Grossmann:**  
andreo.ag16@free.fr  
Tel. 03.69.54.46.93  
poŝtel. 07.82.21.97.34

**Aliĝilo por la 81a Regiona Staĝo de Esperanto en Colmar la 19/20/21ajn de majo 2017**

S-ro S-ino	Familia nomo	Persona nomo	Malpli ol 18 aŭ studento	Aliĝ-kotizo
1	ĉef-aliĝanto			
2	kun-aliĝantoj			
3				

Adreso

---

Telefono: Ret-adreso:

Mi pagas per ĉeko  per ĝiro  al André Grossmann CCP 819 34 U Strasbourg, per internacia ĝiro  al nia peranto en Germanio

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu)

Nombro da tranoktadoj en la hotelo <b>Pri-mo Balladins</b> inkluzive kun matenmanĝo	Kosto por unu nokto kaj unu persono	Vendrede 19	Sabate 20	Di-manĉe 21
1 lita ĉambro	49 €			
1 ĉambro en duobla geedza lito (por 2)	62 €			
1 lito en 2-lita ĉambro	31 €			
1 lito en 3-lita ĉambro	24 €			
1 lito en 4-lita ĉambro	22 €			

La diversaj tag- kaj vesper-manĝoj estas liberaj en restoracioj de la urbo, proksime de la hotelo aŭ de la salono Catherinette.

<b>Vendrede</b> 19.05 14a ĝis 18a	Ekskurso D2: Fervoja muzeo Mulhouse (veturado per buso ekde la hotelo)	22 €	
<b>Sabate</b> 20.05 14a ĝis 19a	Ekskurso D3: Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr-Ĝardeno de papilioj	18 €	
<b>Lunde</b> 22.05 9a ĝis 19a	Tuttaga ekskurso kun tagmanĝo – T1: Strasburgo, Obernai	40 €	
<b>Marde</b> 23.05 9a ĝis 18a	Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawihr: Parko de la cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki	35 €	
<b>Merkrede</b> 24.05 9a ĝis 18a	Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki	35 €	
	kotizo + tranoktoj. + Ekskursoj	Sume	
Pagenda	_____ + _____ + _____		

## ANONCOJ & EVENTOJ

### Esperanto-Ligo Filatelista/Amika Rondo de Esperantaĵ- kolektantoj (ELF-AREK)

Kolekti Esperantaĵojn kaj geamikojn!

#### Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)



Antaŭ nelonge belga esperantisto fondis tute novan fakgrupon esperantistan, **Esperanto-Numismatika Asocio (ENA)**, kies celo estas informi esperantistojn mondvaste pri esperantaj medaloj, moneroj kaj diversaj aliaj pagiloj kaj numismatikaĵoj.

Jam dum pli ol 20 jaroj Bert Boon kolektas, pristudas kaj priskribas la E-numismatikon. Li konstatas, ke la esperanta numismatiko estas ne sufiĉe konata inter esperantistoj kaj ke ĝi tamen estas tre riĉa kaj historie grava kampo por rikolti multajn sciindaĵojn pri la Esperanto-movado.

Tiu, kiu volas membriĝi, simple sendu retmesaĝon pri tiu deziro al ***bert.boon @ skynet.be***. La membreco estas senpaga kaj dumviva. Ne estas kaj ne estos estraro; ĉiuj membroj estas egalvaloraj kaj rajtas komuniki pri ĉiuj aspektoj de la nova grupo.

Ankaŭ senpaga estas la reta revuo *Esperanta Numismatiko* (kvarfoje jare; unua numero en januaro 2014) kies redaktoroj (aktivaj aŭ ne aktivaj) estas la membroj mem. La iniciatinto estas nur la “araneo” en la centro de la “reto”, kiu kolektas kaj dissendas informojn de unuopaj membroj, novaĵojn, ktp. al ĉiuj membroj.

Bulteno *Esperanta Numismatiko*

Aliĝu senpage kaj ricevu la aperintajn numerojn de *Esperanta Numismatiko*. Dume, legu specimenan numeron:

Karaj gesamideanoj:

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto en la historio de Esperanto, estis fondita en 2013 la probable unua fakgrupo “Esperanto-Numismatika Asocio” (ENA) kun revuo “Esperanta Numismatiko”.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro de moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj.

La membro-kvanto de ENA kreskis dum nur du jaroj ĝis 46 individuaj membroj kaj 15 esperantaj bibliotekoj k muzeoj, dise en la mondo.

Agrable estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: “Mi konsentas aliĝi”) kaj krome la *PERRETA* revuo ankaŭ estas tute SENPAGA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, oni tuj ricevos perrete ĉiujn jam aperintajn kaj sekve ĉiujn aperontajn numerojn (4 n-rojn jare).

Nian anoncon vi trovos ankaŭ en Jarlibro 2015 sur p. 68. Se vi deziras pliajn informojn, ne hezitu kontakti nin tiel: [bert.boon@skynet.be](mailto:bert.boon@skynet.be)

Vi rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismatikaj kaj samideanaj salutoj,  
Bert Boon

Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de “Esperanta Numismatiko”



# Nia Vilaĝo

*Homo kaj naturo*

Hodiaŭ ni artikolas pri Provenco, la regiono situata en sudorienta Francio, laŭ Mediteranea Marbordo. Por tiu temo ekzistas du kaŭzoj: unue ĉar tie oni kultivas multege da olivarboj kaj due – pro la konata al vi aktorino, kiu translokiĝis tien kaj verkas librojn pri olivoj.




Jean-Marc Janiaczyk: Apudmara vilaĝo en Provenco

En Provenco vivis la fama Vincent van Gogh, sur kies bildoj la suda suno lumigas abunde la kampojn de tritiko, de sunfloroj kaj kreskantajn apudvoje cipresojn. Lia arto troveblas ĉie: en la plej grandaj muzeoj, bibliotekaj albumoj kaj en privataj kolektoj de riĉuloj. Pro tio, ni decidis ilustri la titolon per arto de amato, kiu eble vivas tie ĉar faris multajn pentraĵojn pri la sudfranca kamparo. Sur la supra bildo, apud la ĉedoma vojo videblas vicoj de violkoloraj kreskaĵoj. Tio estas lavendo (*Lavandula spica* L.) - la tipa planto por tiu provinco. Sed ĉifoje ni prezentas al vi aliaĵon.

## Utilaj plantoj: **Olivujo**

Olivarbo /olivujo (*Olea europaea*) estas ĉiamverda arbo aŭ arbusto mezgranda arbo el familio de oleacoj (*Oleaceae*), kiu atingas altecon ĝis 12 metroj. La arbo mem povas vivi tre longe, foje pli ol mil jarojn. Olivujo kreskas ĉefe en la regionego ĉirkaŭanta Mediteranean Maron, kie klimato estas varma, seka aŭ eĉ duondezerta. En lastaj jarcentoj oni ĝin adoptis ankaŭ en aliaj mond-anguloj, kun simila naturmedio. Vintre olivarboj ne toleras temperaturon malpli altan ol 10 gradojn sub 0°C.



Pro la forta radikaro, ili povas kreski sur malfekunda, ŝtona grundo kaj sur montaj deklivoj, precipe riĉaj je kalk-rokoj.

Homoj kultivas olivarbojn ekde la 4a jarmilo a.K. Oni supozas ke kultivadon de olivoj komencis loĝantoj de antikva Persujo (nuntempa Irano) kaj Mezopotamio, t.e. teritorio en Irako, inter la riveroj Tigriso kaj Eŭfrato.

La plej malnovajn elfosaĵoj montris, ke olivarboj oni uzis en Sirio kaj Palestino. Sur Kreta insulo en Grekio, oni trovis argilan tableton kun bildo de oliv-branĉeto.

Frukto de olivarbo estas drupforma, plej ofte ĉ. 2 centimetrojn longa, grizverda kaj (post la maturiĝo) bruna aŭ blu-nigra. La fruktoj estas riĉaj je vitamino B, natrio, karbonhidrato, polifenolo (ekz. tirosol, fenolacido kaj flavonol), kalcio, fero kaj magnezio.

Oliv-fruktoj estas manĝeblaj krude, sed kutime oni ilin konservas per salo aŭ marakvo kaj (por loka uzado) - foje ilin sekigas.



Antaŭ konservado, oni kutime forigas kernon el olivfruktoj kaj plenigas ilin per kapsiko, ajlo, fromaĝo, kaparoj? (*Capparis* L.) aŭ migdalo.

Je larĝa skalo, manĝaĵindustrio marinadas la fruktojn en vitropotoj aŭ ladskatoloj, uzante por tio vinagron.

Oni povas uzi la fruktojn por fajnigi diversmaniere manĝaĵon en kuirejo (kiel ekz. sur la tre populara pico). Fruktoj de olivujo apartenas al "baza trio" de la mediteranea kuirarto; aliaj du estas tritiko kaj vinberoj.





Ni povas aldoni kelkajn vortojn pri la violet-koloraj olivoj (*kalamata olivoj*) kiuj kreskas en Peloponeza Duoinsulo.

Ili gustas pli delikate kaj estas ofte uzataj en "greka salato".



Monda rikolto de olivfruktoj egalas al ĉ. 20 milionoj da tunoj dum unu jaro.  
El tio, 75% venas el tri landoj: Hispanio, Italio kaj Greklando.

Malgraŭ la menciitaj avantaĝoj de olivofruktoj mem, pli ol 80% de la mondaj rikoltoj oni uzas al produktado de oliv-oleo.



Oleo farita el plej valoraj olivspecoj uzeblas kiel bonega graso por friti aŭ kiel aldonaĵo al salatoj. Kosmetika industrio uzas malpli bonan oleon al produktado de sapo por infanoj aŭ por alergie sentemaj haŭtoj, kiel kuracila kremo ktp. Arĝentverdaj folioj de olivarbo (*Oleae folium*) utilas en herbokuracado.

## Post aktorado, vivo ĉe la naturo

En lasta numero de „NU” vi povis legi pri la 100-jara datreveno de James Herriot, la fama best-kuracisto. Okaze de tiu jubileo, la kvar ĉefaktoroj el filmo „Ĉiuj kreitaĵoj, grandaj kaj etaj” veturis al Jorkŝira regiono kie d-ro Herriot vivis kaj laboris. La kvaropo aktora renkontiĝis tie por celebri tiun jubileon. Kelkdek jaroj pasis ekde kiam la filmo estis produktita kaj kompreneble ŝanĝis aspekton de la homoj\*.

La rolon de Helena, edzino de d-ro Herriot, ludis **Carol Drinkwater** kaj tiu filmo igis ŝin fama. Carol (Karolino) Drinkwater estis tre populara aktorino, irland-devena. Ŝi naskiĝis en Anglio sed infanaĝe vivis en Irlando, plej ofte en la familia farmbieno aŭ en Irlanda Konvento de Kent (Anglio).

Jam komence de sia kariero, ŝi estis membro de la renoma Nacia Teatra Trupo kaj ludis en multaj televidaj filmoj. Al ŝiaj aktoraj atingiĝoj apartenas i.a. kunlaboro en la Nacia Teatro kun fama Laurence Olivier, en filmoj kun Stanley Kubibrick kaj Max von Sydow.








Tamen C. Drinkwater frue ĉesis aktori, edziniĝis kun franca sendependa filmisto Michel Noll kaj translokiĝis al Provenco, suda Francio. Ekde tiam, ŝi vivas en olivplantejo, lokita sur monteta regiono de Cannes, de kie videblas Lazura Marbordo. S-ino Drinkwater plu aktivas en filmfarado, sed ne plu fikcia. Ŝi preferas verki beletra-stile librojn pri kultivado de olivarboj.

Jen kelkaj titoloj: *Oliv-farmo*  
*La itinero de olivoj*  
*Ilustrita oliv-farmo*  
*Sezono de olivoj*  
*Olivrikolto*  
*Forgesita somero*  
*Reveno al oliva farmo*



Tiuj libroj enhavas multe da interesaj informoj pri olivkulturo kaj estas tradukitaj al diversaj lingvoj (ni vidis ilin en la ĉeĥa, ĉina, pola, rusa, kaj sveda). Ili popularigas je internacia skalo la historion, kuirarton kaj tradicion kulturon de olivoj en la regionoj troviĝantaj laŭ norda bordo de Mediteranea Maro.

Tiumaniere C. Drinkwater fariĝis rekonita specialisto pri kulturo de olivoj kaj oni invitas ŝin al diversaj landoj por literaturaj vesperoj, prelegoj kaj renkontiĝoj kun la legantoj. Al eksperta grupo invitis ŝin UNESKO, por kunkrei la *Mediteranean Itineron de Oliva Heritaĝo*. Nuntempe ŝi kun la edzo preparas dokumentan filmon pri kultivado de olivoj ĉirkaŭ Mediteranea Maro kaj UNESKO patronas tiun projekton.



„Oliva farmo” estas la duobla amrakonto. Unue, pri reciproka enamiĝo de la aŭtorino kun televida produktisto Mikaelo. Due, amo al unu konkreta loko en la mondo. La edziniĝinta geduo decidis ekloĝi en franca kamparo. Karolino kaj Mikaelo trovis forlasitan olivfarmon kaj, malgraŭ la detruita domo, ili eksentis ke tio estos la peco de ilia paradizo. Same kiel oliv-fruktoj ŝanĝas siajn kolorojn de la verda, tra ruĝa ĝis brile nigra – tiel ilia vivo ivitas eniri la vibrantan atmosferon de la mediteranea naturo. Per tiuj libroj, la legantoj konatiĝas kun provencaj kutimoj kaj kuirarto, sentas la streĉojn pro bankrotita risko komence de la rekonstruota domruino, malsano de la edzo ktp. Inter ĉia tio, ne mankis tagoj feliĉaj kiel ekzemple dum la unua rikolto el la propra olivbieno.



Gesinjoroj Noll- Drinkwater: komuna hobia proksimigas homojn

S-no Drinkwater evidente ĝuas vivi en Provenco, kontakti ties vilaĝanojn, frandi fruktojn, gustumi vinojn kaj surloke faritajn fromaĝojn. Estas bone trovi sian lokon sub la suno. Verŝajne tiuj libroj inspiris multajn legantojn trovi ĉarmojn kaj belecon - ankaŭ en sia naskiĝurbo aŭ familia vilaĝo.




\* Aktora kvaropo venis al Jorkŝira regiono, kie vivis James Herriot. Ili festis la 100-jaran datrevenon de lia naskiĝo.

La unua foto montras ilin en la filmo, farita antaŭ 40 jaroj. Kvankam tempo senindulge ŝanĝas aspekton de ĉiu, gravas teni la koron juna.



## La 32-a ARKONES 23. - 25. 9. 2016

La antaŭlastan semajnon de septembro jam la 32-an fojon okazis en Pollando en la urbo Poznano la tradiciaj ARTaj KONfrontoj en ESperanto (ARKONES). La aranĝo okazis en fervojista kulturdomo tute proksime de la bela urbocentro. Partoprenis ĝin 208 esperantistoj el 21 landoj.



En tri tagoj la organizantoj sukcesis proponi riĉegan programon: trideko da prelegoj, filmoj, koncertoj, spektakloj kaj aliaj prezentadoj. En la koridoro la partoprenantoj povis rigardi ekspozicion "Woodstock 2016 - Mult-



kultura Vilaĝo". La nivelo de prezentitaj programeroj estis alta dank'al kontribuo de konataj profesoroj kaj eminentuloj el la interlingvistikaj studoj ĉe la universitato UAM de Poznano, kiuj la aranĝon ankaŭ partoprenis. La libroservo proponis librojn kaj aliajn esperantaĵojn. Surloke funkciis bufedo kun kafejo, kie la ĉeestantoj povis refreŝiĝi per biero kaj ne tro koste manĝi.



Listigo de programeroj ne sufiĉas por priskribi la tutan aranĝon. Okazis primovada kunveno de la pola E-junularo, kurso pri unua helpo. Estis prezentita la libro "Memoraĵoj de kampara knabo". Oni parolis pri la greka krizo, pri lingva diverseco, pri apliko de la 15-a regulo, pri bliss-a skribo, pri feroaj dancoj kaj spirtaj splitoj, pri beletra almanako, pri amo de la vidpunkto de psikologo, pri projekto de Esperanto-domo en Katmanduo, pri sekreto de abeloj, pri kuirarto de la antikva Romo kaj pri aliaj interesaj te-

moj. Paralele kun Arkones okazis unu-semajna trejnado konektita kun la projekto ERAZMUS+ en kiu partoprenis 3 Germanoj, 3 Slovakoj kaj 7 Poloj. Ĝi estis gvidata per Katalin Kováts kaj Silvain Lelarge. La projekto celas eduki venontajn instruistojn kaj aktivistojn de Esperanto. Tre grandan sukceson havis la teatraĵo "La kredito" prezentita de Georgo Hanzlik kaj Saŝa Pilipoviĉ.







Pri meritoj de Michel Duc Goninaz kaj Detlev Blanke, kiuj kun bedaŭro forpasis ĉi-jare, omaĝis Ulrich Lins, Barbara Pietrzak, Probal Dasgupta kaj Katalin Kováts subvide de Ilona Koutny kaj Zbigniew Galor. Sojle de Zamenhof-jaro 2017 parolis Barbara Pietrzak kaj pri digna festado de la sama afero internacie en Germanio kaj Pollando parolis Johano Pachter.

La organizantoj zorgis pri altnivela muzika programo okazinta en la granda salono *Spiegulejo*. Ni spektis koncertojn kaj aliajn

amasajn aranĝojn kiel ĉendancadon kaj filmprezentadojn. La unuan vesperon ni povis aŭskulti altnivelan piankoncerton de Joachim Kolpanowicz. Mikaelo Bronŝtejn prezentis kantojn de rusiaj bardoj kaj Tomio Frejarö gitarludis kaj kantis. Sekvan tagon prezentiĝis kaj koncertis sur scenejo la ensemble "E-familio kaj Gosia Sarata", kies junulara parto kantis kelkajn kantojn kaj kantis la publikon per popularaj konataj kantoj.

Dum la tradicia miel-vespero ni estis regalitaj per medo. Varia prezentado de muzikaĵoj ne elrevigis la partoprenantojn kaj instigis ilin al dancado je la fino. Prezentiĝis arkonesa koruso, kantis Zuzana Kornicka. El Berlino venis ensemble "Klezmorim Sennomaj" kaj la vespero finiĝis per energi plena koncerto de duopo Slezak.



ARKONES estas festivalo, kiun partoprenas konataj artistoj el Esperantujo kaj la vesperaj programeroj abundas je kvalitaj koncertoj. Ĝi estas estos- kaj kulturplena aranĝo. Al la bona evento ankaŭ kontribuas kutime belega aŭtuna vetero.



*Liba Gabalda*





## ALIGILO por la 69-a kongreso de IFEF 16-a ĝis 23-a de majo 2017 Colmar Francio

**LKK-adreso: André Grossmann**  
5, rue des Pyrénées  
68390 BALDERSHEIM Francio

**Retadreso:**  
jeanripoche@wanadoo.fr  
andreo.ag16@free.fr

**Pagoj por Francio:**  
Per ĝiro al André Grossmann  
CCP 819 34 U Strasbourg  
aŭ per franca ĉeko al  
André Grossmann, 5 rue des Pyrénées  
68390 BALDERSHEIM

**Internacia ĝiro al: André Grossmann**  
IBAN: FR6920041010150081934U03669  
BIC: PSSTFRPPSTR  
aŭ al **UEA-konto** de TAKE ekat-i

Familia nomo	Persona nomo	Naskiĝjaro
Adreso		
Telefona: _____ Poŝtelefono: _____		
Ret-adreso: _____ @ _____		
IFEF-ano <input type="checkbox"/> jes <input type="checkbox"/> ne <input type="checkbox"/> viro <input type="checkbox"/> virino		
Mi antaŭpagas jenan sumon _____ eŭroj		
per <input type="checkbox"/> ĝiro <input type="checkbox"/> franca ĉeko <input type="checkbox"/> UEA-konto de TAKE		

Kongreskotizo en eŭroj ekde la 1.1.2017		Sumo
IFEF-membro	80	
Familiano, junulo ĝis 30 jaroj, kaj IFEF membro loĝanta en B-landoj laŭ UEA-difino	40	
Ne IFEF-membro	90	
Ĉambro-perado	5	
<b>D1a:</b> Urbovizitado Colmar, piede	3	
<b>D1b:</b> Urbovizitado Colmar per trajneto, 45 mn	10	
<b>D2:</b> Fervoja muzeo Mulhouse	22	
<b>D3:</b> Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr-Ĝardeno de papilioj	18	
Tuttaga ekskurso kun tagmanĝo – <b>T1:</b> Strasburgo, Obernai	40	
Tranoktado laŭ elekto (minimume 1 nokto)		
Libervola donaco al la kongresa kaso		
Postkongresoj	09.00 18.00	35
Marde 23.05		
Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawihr: Parko de la cikonioj kaj lutroj, <b>sen tagmanĝo:</b> restoracio surloke; ebleco pikniki		
Merkrede 24.05	09.00 18.00	35
Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo <b>sen tagmanĝo;</b> ebleco pikniki		
<b>Ĉambro mendilo</b>		Sume

- ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ**
- Ĉiu partoprenanto bonvolu plenigi kaj sendi apartan aligilon por la kongreso al la adreso de LKK.
  - Sendu la pagon nur en Eŭro al la indikita bankkonto de la LKK. Oni traktos la aligilon nur post alveno de la pago.
  - Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aligilon, menciuj precizajn informojn pri la koncerna persono: nomo, lando, kompleta adreso.
  - Kongres-kotizo neniukaze estas repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la **malmendon ĝis la 31-a de marto antaŭ kongreso.**
  - LKK konfirmos la akcepton de ĉiu aligilo post la ricevo de la koncerna pago per indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
  - LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn, se alta inflacio aŭ aliaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj postulus tion.

**Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aligilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san- kaj akcident-asekuron por mia restadperiodo en Francio dum la 69-a IFEF Kongreso kaj Postkongreso.**  
Mi konsentas (ne konsentas), ke mia retadreso estu skribita en la kongresa libro (substreku).  
Mi venos en Colmar per .....  
la .....-an de majo je la .....-a horo.  
**Loko:**.....  
**dato:**.....  
**Subskribo:**.....

**Nepre menciuj, kaze de plurlita ĉambro, la kunloĝanton/-jn! Alie vi pagos la prezon por unulita ĉambro.**  
Mi loĝos kun: .....  
Mi mendas la jenajn noktojn (bonvolu signi)  
Hotelaj prezoj en eŭro: por unu nokto kaj unu persono, inkluzive kun matenmanĝo.

Noktoj	14-15	15-16	16-17	17-18	18-19	19-20	20-21	21-22	22/23	23-24	24-25	25-26

<b>Colmar - Hotelo Primo Balladins, dustela</b>		
<b>1 lita ĉambro</b>		<b>49 €</b>
<b>1 lito en 2 lita ĉambro</b>		<b>31 €</b>
<b>1 ĉambro en duobla geedza lito (por 2 personoj)</b>		<b>62 €</b>
<b>1 lito en 2 lita ĉambro por handikapitoj (entute 3 ĉambroj)</b>		<b>31 €</b>
<b>1 lito en 3 lita ĉambro</b>		<b>24 €</b>
<b>1 lito en 4 lita ĉambro</b>		<b>22 €</b>

**Kiel atingi la kongres-urbon Colmar // hotelon// kongresejon**

**Aviadile** al la flughaveno Bâle-Mulhouse aŭ Basel-Mulhouse. De tie aŭtobuso veturas al la plej proksima fervoja stacidomo de Saint-Louis (10mn). Poste per trajno al Colmar (40 mn)  
**Trajne:** diversaj rapid-trajnoj TGV alvenas al Colmar de Parizo, de Marseille, de Svislando, de Germanio.



PROVIZORA PROGRAMO			
Mardo 16.05	10.00 – 21.00 17.00 – 18.00 18.00 – 19.00 19.00 –	Akceptado / Informado Kunveno de la IFEF Estraro kaj LKK Kunsido de la IFEF Estraro Interkona vespero	Akceptejo de la hotelo Hotelo (saloneto)  Saloneto de la hotelo
Merkredo 17.05	08.00 – 10.00 13.00 – 20.00 <b>10.00 – 12.00</b> 12.00 – 12.30  14.00 – 18.00  20.30 – 22.00	Akceptado / Informado " " <b>Solena Inaŭguro</b> Komuna foto, Gazetara konferenco <i>paŭzo</i> Urbovizitado (D1a, b) – Colmar (piedire aŭ per trajneto); gustumado de vinoj, komuna por ambaŭ grupoj <i>paŭzo</i> Kultura programo: <b>La grupo "VOGESIA" de Colmar</b>	Akceptejo de la hotelo " " <b>salono Catherinettes</b>  <b>Colmar</b>  Catherinettes
Ĵaŭdo 18.05	<b>09.00 – 12.00</b> 10.00 – 12.00  14.00 – 16.30 16.45 – 18.00 <b>14.00 – 16.30</b>  20.00 – 21.00 21.00 – 22.00	<b>Nepublika Komitatkunsido</b> E-kurso por komencantoj <i>paŭzo</i> Kunsido de la Faka Komisiono Movadaj aferoj; kunsido de la laborgrupoj, publika <b>Ateliero pri informadiko (bazaj informoj)</b> <i>paŭzo</i> Prelego pri la regiono: <b>Elzaso/Alzaco - Edmond Ludwig</b> Venonta kongreso sin prezentas - <b>Wrocław, Pollando</b>	Catherinettes Catherinettes (saloneto)  Catherinettes Catherinettes Catherinettes (saloneto)  Catherinettes
Vendredo 19.05	<b>09.00 – 12.00</b> 10.00 – 12.00  14.00 – 18.00  21.00 – 23.00	<b>Plenkunsido</b> E-kurso por komencantoj <i>paŭzo</i> <b>Ekskurso D2 – Fervoja muzeo "Cité du Train"</b> <i>Paŭzo</i> Kultura kaj dancvespero kun <b>Fernando</b>	Catherinettes Catherinettes (saloneto)  <b>Mulhouse</b>  Catherinettes
Sabato 20.05	09.00 – 12.00 10.00 – 12.00 09.00 – 12.00 09.00 – 11.00 11.00 – 12.00  14.00 – 18.00  20.00 – 22.00	Libroservo funkcias E-kurso por komencantoj Kunsido de FFEA ( <i>Franca Fervojista Esperanto-Asocio</i> ) Kunsido de la Faka Komisiono Kunsido de la laborgrupoj, publika <i>paŭzo</i> <b>Ekskurso D3 – Kaysersberg, Riquewihr, Hunawirh -</b> Ĝardeno de vivantaj papilioj <i>paŭzo</i> <b>koncerto Grazia Barboni, Italio</b>	Catherinettes Catherinettes (saloneto) Catherinettes Catherinettes Catherinettes   Catherinettes
Dimanĉo 21.05	09.00 – 12.00 10.00 – 12.00 <b>09.00 – 12.30</b>  <b>12.30 – 13.00</b>  14.30 – 15.30 15.30 – 16.00 16.00 – 18.00  20.00 – 22.00	Libroservo funkcias E-kurso por komencantoj <b>Ĉefa fakprelego kaj aliaj prelegoj</b> Prelego: <b>Vizitu Baraton per trajno-Liba kaj Floreal Gabalda</b> <b>Solena fermo</b> <i>paŭzo</i> Komitatkunsido de EFE ( <i>Espéranto France - Est</i> ) Kunveno de la IFEF Estraro kaj LKK Estrarkunsido de IFEF <i>paŭzo</i> <i>Teatrumado kun libera improvizado-programero proponita de</i> <i>Mirejo (Mireille Grosjean, prez de ILEI)</i>	Catherinettes Catherinettes (saloneto) Catherinettes  <b>Catherinettes</b>  Hotelo (saloneto) Hotelo (saloneto) Hotelo (saloneto)  Catherinettes
Lundo 22.05	09.00 – 19.00	<b>Tuttaga ekskurso – Strasburgo, Obernai</b>	



Aliĝiloj en formato A4 pdf kaj en A4 Word estas el-  
ŝuteblaj de la retejo:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>


Eblas komputile plenigi la Word-aliĝilon kaj ĝin sen-  
di aldone al ret-mesaĝo al niaj LKK

La hotelo Primo Balladins,  
5 Rue des Ancêtres, Colmar  
troviĝas je 20 mn de la staci-  
domo.

Retadreso:  
andreo.ag16@free.fr  
jeanripoche@wanadoo.fr



## Ni lernu per enigmoj kaj distraĵoj



JG

### TRI URSOJ

Iam eta knabino Manjo foriris al arbaro por kolekti fungojn kaj berojn. Ŝi ne rimarkis kiel profunde ŝi eniris en la arbaron kaj perdiĝis. Ŝi longe serĉis la rean vojon, iris-iris, kaj alvenis al iu dometo en arbara densejo.

Manjo aliris al pordo kaj frapis. Neniu respondis. La pordo ne estis ŝlosita kaj ŝi eniris en la dometon. Meze de la manĝoĉambro staris tablo kaj tri seĝoj: la granda, la mezgranda kaj la malgranda. Kaj sur la tablo estis tri bovloj kun kaĉo. Manjo jam delonge ne manĝis kaj estis malsata. Tial ŝi sidiĝis sur grandan seĝon, prenis grandan kuleron kaj gustumis la kaĉon el granda bovlo. La seĝo estis tro alta kaj larĝa, kaj la kaĉo – tro varma. Ŝi sidiĝis sur la mezgrandan seĝon, prenis mezgrandan kuleron kaj gustumis la kaĉon el la mezgranda bovlo. Ankaŭ tiu seĝo estis tro alta, kaj la kaĉo estis tro malvarma. Tiam Manjo sidiĝis sur malgrandan seĝon, prenis malgrandan kuleron kaj gustumis la kaĉon el la malgranda bovlo. La kaĉo estis nek varma, nek malvarma, kaj tiom bongusta, ke ŝi formanĝis tutan kaĉon el la malgranda bovlo. Kaj estis tiom bone al Manjo, ke ŝi komencis balanciĝi kun la seĝo kaj hazarde trarompis ĝin.

Manjo sentis sin tre laca. Do, ŝi iris al najbara ĉambro. Tie staris tri litoj: la granda, la mezgranda kaj la malgranda. Manjo kuŝiĝis en la grandan liton, sed tiu estis tro alta kaj larĝa. Ŝi kuŝiĝis en la mezgrandan liton, sed ankaŭ tiu estis ankoraŭ tro alta. Tiam ŝi kuŝiĝis en la malgrandan liton. Tiu estis tiom oportuna kaj mola, ke ŝi tuj ekdormis.

En tiu domo loĝis tri ursoj: la patro Ursego, la patrino Ursino kaj la filo Urseto. Ili revenis el arbaro malsataj kaj lacaj. Jen, aliras ili la tablon kaj rigardas en siajn bovlojn.

– Kiu gustumis el mia bovleĝo? – kriegis Ursego.

– Kiu gustumis el mia bovlo? – kriis Ursino.

– Kiu gustumis el mia bovleto kaj formanĝis la tuton? – krietis Urseto.

Rigardas la ursoj al siaj seĝoj:

– Kiu sidis sur mia seĝego kaj deŝovis ĝin? – kriegis Ursego.

– Kiu sidis sur mia seĝo kaj deŝovis ĝin? – kriis Ursino.

### HORIZONTALALE:

1. Sud-okcidenta azia lando.
2. Prefikso. Rolo sen vokaloj. Scienc'.
3. Insul' en la Hindia Oceano.
4. Parfume. Regnokodo de Gabono.
5. Pec' de teksaĵo por kovri tablon.
6. Nek sen koro. Urba vagonaro.
7. Ĉesu. Prizon' por birdo.
8. INVERSE:kapti per sia mano. INV: Rabobesto.
9. Nomo de litero. Monto de Kalvario.

### VERTIKALE:

1. Sabat' kaj dimanĉ'.
2. Araneul'. Belarto. 3. Havaĵ' de la edzino. Partikulo.
4. Verkist' de teatraĵo.
5. Branĉ' de matematiko. Nomo de litero.
6. Mev'.
7. Postulat'. Inversa litero. 8. Organ' de birdo. Veneno.
9. Konceptu. Kreokapabl'.
10. INV:dentoputro. Plezuro.

– Kiu sidis sur mia seĝeto kaj rompis ĝin? – krietis Urseto.

Do, ili iris al la dormoĉambro por ripozi kaj vidis siajn litojn.

– Kiu kuŝis en mia litego kaj ĉifis ĝin? – kriegis Ursego.

– Kiu kuŝis en mia lito kaj ĉifis ĝin? – kriis Ursino.

– Kiu kuŝis en mia liteto kaj ankaŭ nun tie kuŝas? – krietis Urseto kaj tuŝis la dormantan knabon.

Manjo vekigis pro tio, ekvidis la tri ursojn, kiuj staris super ŝi kaj fulme saltis tra apuda malfermita fenestro for de la domo kaj timigaj bestoj. Ŝi kuris sen vidi la vojon, kuris-kuris, kaj bonŝance fine alkuris al sia vilaĝo. Ekde tiam ŝi ĉiam rigardis la vojon por ne perdiĝi en la arbaro kaj hazarde ne trafi al la tri ursoj.



SOLVO de la KVE de La Informilo 175 :

1.ABELSVARMO 2.DANIO. LOIV 3.ORIENTI. NE 4.LIGNOTUBER 5.EL. OR. RB 6.SON. IROMA 7.EBLE. OLE 8.ABLATIV 9.NEAKURATEC 10.TIBERI. AKO

VERTIKALE: 1.ADOLESKANT 2.BARILO. BEI 3.ENIG. NELAB 4.LIENO. BAKE 5. SONORILTUR 6.TT. REIRI 7.ALIULO. VA 8. RO. MOOTA 9. MINERAL. EK 10.OVERB. ER-



## ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2017 ĝis 2019

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta  $20 - 66\% = 6,80$  eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de kotizoj kaj donacoj ricevataj en 2016 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2017.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

		Jaroj:	2017	2018	2019
		Abono por la papera versio:	17 eŭroj	17 eŭroj	17 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
<b>UEA</b>	MG MJ(-T)	<ul style="list-style-type: none"> <li>• Individua Membro kun Gvid-libro tra la Esperanto-movado.</li> <li>• Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkluzive 34 jarojn, membro en TEJO kun la revuo Kontakto sen plia abonpago).</li> </ul>			11 eŭroj 26 eŭroj 64 eŭroj
Pag- manieroj	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize menci la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: ekzemple: abono Informilo + kotizo 2017 por 1208				
	<b>2. Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2017, 2018				
	<b>3. Por Germanio al nia peranto:</b> Poŝtĝirokonto: 918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen, je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)				
	<b>4. Per internacia ĝiro</b> je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu menci la celon de via pago kaj vian adreskodon)				
	<b>5. Al UEA-konto de TAKE ekat-i (menciu la celon de via pago kaj vian adres-kodon)</b>				

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

### "De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 11 + 2,80 = 13,80 eŭroj

### Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 1,40 = 2,90 eŭroj

### Ĝin rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 5,50 = 17,50 eŭroj

Poŝamiko Jen agrabla libreto, kiu trafe prezentas sur 40 paĝoj, gramatikajn resumojn, tekstetojn, kelkajn

ekzercojn kaj laŭtemajn bild-vortarojn riĉe kolor-ilustritajn. 5,10 + 1,40 = 6,50 eŭroj

## Nos cotisations 2017

Vous venez de recevoir le dernier numéro de notre bulletin trimestriel, **LA INFORMILO** pour la période 2016. Vous avez sans doute apprécié son contenu et vous désirez continuer à le recevoir régulièrement pour 2017 (4 numéros par an). A cet effet nous vous présentons ci-dessous les différentes cotisations 2017 et nous vous invitons à les payer dès maintenant. Nous espérons ainsi vous retrouver parmi nos abonnés et/ou nos membres.

### COMMENT PAYER VOS COTISATIONS ET VOTRE ABONNEMENT ?

#### 1. Association Régionale ESPÉRANTO FRANCE-EST :

La cotisation à notre Association Régionale ainsi que l'abonnement à **LA INFORMILO** sont à payer:

- de préférence par virement postal à **Espéranto France-Est CCP 1997 72 W NANCY** n'oubliez pas de mentionner sur la ligne de message le but de votre paiement et si possible votre code-adresse. *Ex. Abono Inf + kotizo 2017 por 756*
  - par chèque bancaire à l'ordre de **Espéranto France-Est**, mais adressé à notre trésorier:  
S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM.
  - Profitez de votre paiement pour mentionner tout changement ou correction d'adresse. Une adresse différente sur un chèque n'est pas considérée comme nouvelle adresse. Indiquer votre adresse courriel pour l'abonnement version pdf.
- Nova** • Une cotisation fédérale de 20 euros vous est proposée. Elle permet de déduire 66% des impôts. Ainsi vous n'aurez payé que  $20 - 66\% = 6,80$  euros, mais notre association aura reçu 20 euros.

Abonnement et cotisation pour les années:	2017	2018	2019
Abonnement à <b>La INFORMILO</b> version papier	17 €	17 €	17 €
Abonnement à <b>La INFORMILO</b> version internet (format pdf)	7,5 €	7,5 €	7,5 €
Adhésion à l'Association <b>Espéranto France-Est</b> (à rajouter à l'abonnement)			
• <i>Cotisation fédérale</i>	7 €	7 €	7 €
• <i>Cotisation fédérale de soutien avec reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt</i>	20 €	20 €	20 €

#### 2. Association Internationale UEA (cotisations 2017)

Les cotisations à l'UEA peuvent être payées directement à notre association Espéranto France-Est par l'intermédiaire de notre trésorier S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM qui transmettra dans les meilleurs délais.

Veuillez noter le code de la cotisation que vous payez. (cotisation UEA MA)

UEA	• Membre individuel reçoit le petit guide de l'UEA	MG	11 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA	MJ	26 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30 ans)	MJ-T	26 €
	• Membre individuel reçoit l'annuaire de l'UEA + la revue mensuelle ESPERANTO	MA	64 €
	• (+KONTAKTO + TEJO-TUTMONDE, si moins de 30ans)	MA-T	64 €

#### 3. Association Nationale Espéranto-France (UFE) (cotisations 2017)

Les cotisations à l'UFE sont à payer directement à UFE, 4bis, rue de la Cerisaie, 75004 PARIS - CCP: 85535D PARIS, en y joignant le bulletin d'adhésion, que vous avez reçu en tant que membre 2016 de l'UFE. **Votre adhésion à notre Association Régionale est comprise dans les cotisations de l'UFE si votre adresse se trouve dans les départements 54 55 57 67 68 88.**

**Par contre l'abonnement à LA INFORMILO est à payer à notre Association Régionale, mais jamais à l'UFE.**

UFE	• Membre actif d'Espéranto-France (avec reçu fiscal)	39 €
	• Membre actif d'Espéranto-France et d'Espéranto-Jeunes. (moins de 30 ans au 1.1.2017)	30 €
	• Tarif réduit pour étudiants, chômeurs	15 €
	• Première année	10 €
	• Cotisation pour un couple (avec reçu fiscal)	78 €
Le Monde de l'espéranto: Tous les numéros sont désormais librement accessibles en ligne dès leur publication sur le site: <a href="http://esperanto-france.org">esperanto-france.org</a>		

### IMPORTANT

- 1) Les nouveaux adhérents à l'Association Régionale, recevront par courrier séparé leur carte de membre ainsi qu'un exemplaire des statuts de l'Association.
- 2) Les cartes de membre de l'année 2017 et éventuellement de l'année 2018 seront envoyés aux autres membres d'**ESPERANTO FRANCE-EST** par courrier séparé avec des informations spécifiques ou inclus dans l'envoi du bulletin La Informilo .
- 3) Les membres payant une cotisation fédérale de soutien ou un don en 2016 recevront un reçu fiscal pour bénéficier de 66% de réduction d'impôt pour la déclaration à faire en 2017.



**LA 28-a EŬROPA RENDEVUO**  
**19-20.11.2016**

La evento okazis en norda Francio proksime al la marbordo en la feriejo *Stella-Maris*. Ĝi situas apud la famkonata banurbo *Le Touquet*. Renkontiĝis 54 geesperantistoj, precipe francoj el norda regiono kaj kelkaj partoprenantoj el Belgio kaj unu el Germanio.

Sabate posttagmeze la ĉeforganizanto Roch Jullien bonvenigis la ĉeestantojn kaj prezentis al ili la dutagan programon. Salutis ankaŭ la prezidanto de la Nordfrancia Federacio Michel Dechy kaj Arlette Plutniak. Tuj poste komenciĝis lingvoinstruado en tri grupoj. La tri komencantojn prizorgis Katalin Kováts. Ŝi gustumigis al ili la lingvon donante kelkajn bazajn lecionojn kaj ekzercojn. Ĉeestis ankaŭ lingve spertaj esperantistoj, kiuj iom helpis ekzercigante kaj kuraĝigante la novulojn. La etoso de la kurso estis tre agrabla kaj ĉiuj multe amuziĝis. Kun Katalin oni ĉiam lernas kun plezuro. Michel Dechy gvidis kurson por pli spertaj partoprenantoj kaj instruis ilin laŭ la libro de Tinĉjo kaj aliaj bildolibroj. La ŝatantoj de la E-literaturo studis kun Anne Jausions. Ankaŭ ili akiris novajn sciojn pri esperantlingvaj aŭtoroj. Arlette Plutniak zorgis pri ateliero de *Hatha jogo*. La adeptoj kaj ŝatantoj de jogo ekkonis la teorion kaj praktikadon de fizikaj ekzercoj de tiu saniga tradicio kun spirita kerno.

Dum la kafopaŭzo ni povis admiri vastan kaj mirindan ekspozicion de Katalin pri vitraj ornamaĵoj kaj allogaj juveloj por virinoj. Alia interesa ekspozicio konsistis el pentraĵoj de Francine Longue-Épée kaj Joëlle Muller kaj skulptaĵoj de Alain Chalm. Mi kontribuis per kelkaj memfaritaj dekoraĵoj el bidoj kaj alportis kelkajn fotoalbumojn kun raportoj pri diversaj Esperanto-aranĝoj por konsulto.

Vespere koncertis fama kaj tre ŝatata JoMo. Ĉi-foje ni estis privilegiitaj per lia tute nova spektaklo. Ĉiuj estis ravitaj pri novaj kanzonoj en nekutima stilo sen gitaro. En kelkaj kantoj lin akompanis la buŝharmoniko kaj eta brazila tambureto, kiun li pendigis ĉirkaŭ la kolo. Ni admiris lian talenton kaj poste ni plu babilis ĉe glaso da cidro, biero aŭ diversaj fruktosukoj en la akceptejo ĝis malfrua horo.

Dimanĉe matene daŭris la instruado ĝis la 10:15 horo kaj poste estis libera tempo por kafumi, promeni al la strando de *Stella* aŭ viziti foiron de libroj en la urbo *Touquet*. Por la religiemuloj okazis en la apuda kapelo meso en Esperanto. Pro forta vento kaj pluvo pluraj restis en la domo kaj ludis je kartoĵoj aŭ rigardis ekspoziciojn. Libroservo proponis vastan gamon da libroj, kasedoj kaj aliaj esperantaĵoj.



Post la bona tagmanĝo ni festis kun Katalin la 15-an datrevenon de *edukado.net* per torto. Multaj bondeziroj de tiu grandioza sukceso fluis al Katalin. Post tiu agrabla surprizo ni komune fotiĝis antaŭ la konstruaĵo. Ĉe la fino de la renkontiĝo gvidantoj de la respektivaj kursoj resumis sian laboron. Poste estis prezentitaj aktivaĵoj de la jaro kaj sekvis kelkaj invitoj al venontjaraj eventoj en Esperantujo. Ni eksciis pri kelkaj eldonitaj libroj esperanten tradukitaj, pri la franca nacia Esperanto-kongreso en *Mandres-les-Roses*, pri la fervojista kongreso en *Colmar*, pri SES en Slovakio, pri

PSI en Germanio, pri eblo de trajnvojaĝo de Berlino tra Siberio al la UK en Koreio. La programo finiĝis per dancado. Dankojn meritas la organizanto kaj la helpantoj de la tre agrabla novembro semajnfino.

*Liba Gabalda*



# 28a Eŭropa rendevuo 19-20.11.2016 en Le Touquet

